

38-a jaro. Nro 89-a. 1-a semestro 2012.



VENEZUELA STELO

Organo de la Venezuela Esperanto-Asocio

ISSN 1316-0451



**Stellarium: Mojosa
planetario en via komputilo!**

Mediterranea Esperanto-Semajno

Promenado tra la historia centro de Karakaso

Poemlibro de Aleksandro Logvin



Enhavtabelo

E-Muziko: Noticoj de Vinilkosmo paĝo 3-a

Mediterranea Esperanto-Semajno
Raportas: Liba Gabalda paĝo 4-a

Poemlibro de Aleksandro Logvin
Komentas: Johano Negrete paĝo 6-a

Sankta Semajno en mia vilaĝo
Aŭtoro: Ricardo Coutinho paĝo 8-a

Promenado tra la historia centro de Karakaso
Ricardo Coutinho paĝo 10-a

KATORELO - Bela libro pri aventuroj de katido
Johano Negrete paĝo 15-a

Princino de Marso, romano de E.R. Burroughs
Johano Negrete paĝo 16-a

Universitata Urbo de Karakaso
Artikolo kaj fotoj: Ricardo Coutinho paĝo 17-a

Stellarium: Mojosa planetario en via komputilo!
Ramón Morales Castel paĝo 21-a

Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto jam kilobajtas!
Ramón Morales Castel paĝo lasta

Foto en la frontpaĝo: Arko de la Federacio, Karakaso.
Fotis: Ricardo Coutinho.



VENEZUELA STELO
Organo de la Venezuela Esperanto-Asocio



Asociación Venezolana de Esperanto
Venezuela Esperanto-Asocio

VENEZUELA STELO
Apartado postal 47675, Caracas 1041-A.
Telefonnumero: 58-0212.662.9224
www.esperanto-venezuela.org
venesperanto@cantv.net

Estraranoj:

Prezidanto: Johano Negrete.
Vic-Prezidanto: Juan Miranda.
Sekretario: Ricardo Coutinho.
Kasistino: Elizabeth Miranda.

Aldelegitoj:
Esteban Mosonyi
(Konferencoj kaj Interinstituciaj Rilatoj).
Nancy Aquino (Eldonado).
Aguiles Rivas (Biblioteko).
Silvana Messori (Instruado).

Redakcia Responsulo:
Ricardo Coutinho.

Kunlaborantoj:
Liba Gabalda.
Johano Negrete.
Ramón Morales Castel.

Grafikisto: Ramón Morales Castel.

Pri la enhavo de niaj artikoloj repondekas iliaj aŭtoroj. Manke de indiko de la aŭtoro, repondekas la redakcio. Niaj artikoloj kaj informoj povas esti parte aŭ plene republikigitaj por laŭleĝaj uzoj, kondiĉe ke oni citu la fonton. Krome, ni ŝatus ricevi leterojn de niaj legantoj, kun taksoj, opinioj, sugestoj kaj kritikoj. Tio ebligus al ni la plibonigadon de la revuo, pri kio ni antaŭdankas la kunlaborantojn.



E-Muziko: Noticoj de Vinilkosmo

Informletero de Vinilkosmo n-ro 33 pri aktualaj esperanto-muzikoj (Aprilo 2012)

La fajro en kelkaj ejoj ĉe Vinilkosmo kaŭzis grandajn zorgojn kaj eluzon de multa energio en la fino de la pasinta jaro. Sed la unua trimonato de 2012 estas tre riĉa je projektoj kaj novaĵoj. Kaj do ni havas la jenan okazon paroli al vi pri pli ĝojaj perspektivoj. La ĉefa evento estas sendube la publikiĝo de la unua tutesperanta albumo de Zhou-Mack Mafuila. Li estas delonga muzikisto kun muzikaj kaj kulturaj radikoj tro diversaj por prirakonti alie ol en la lingvo por ĉiuj. Li estas absolute malkovrenda! Ankaŭ Eterna Rima preparas surprizon por la venonta monato, kaj konfirmas la ĉeeston de hipopo en la vasta kantmuzika horizonto en esperanto. Li ofertas kaptindan ekskluzivaĵon dum la tuta monato majo. Malsupre ni prezentas kelkajn videofilmojn kaj muzikeltiraĵojn, kaj ankaŭ novan aŭskultindan retradion. Ni esperas ke vi pasigos agrablan momenton de senstreĉiĝo!

Nia kompleta katalogo ĉe : <http://www.vinilkosmo.com>

VKKD 110 "Originoj" - ZHOU-MACK MAFUILA

Zhou-Mack Mafuila jam diskrete aperis en nia katalogo kun la bando FreeMagniZhou sur VK-Kompil II en 1996 ; nun finfine li proponas al ni sian unuan tutesperantan albumon. Se Zhou-Mack estas nur je sia unua verko komplete dediĉita al la Internacia Lingvo, li tamen delonge ne plu estas komencanto, ĉar li jam havis multajn muzikspertojn kun konataj personoj kiaj Chico Freeman, Archie Shepp, kaj Ravy Magnifique, inter multaj aliaj, inkluzive tre fruktodonan vivsperton kun la bando La Fève. Ankaŭ lia unua kontakto kun esperanto datas de lia infanaĝo, ĉar tiu lingvo estis jam integrita en la tradicion de lia deksex-infana familio, same kiel la muziko, jam ĉiomgrava kiam li estis nur knabeto. Lia renkontiĝo kun Jah Lucky, konga rasta muzikisto vivinta en Francio, estis baza influo por Zhou-Mack. Kaj la senĉesa kunesto kun tiu iniciatinto al regeo dum li studadis literaturon kaj regule ludis zairan rumbon kun deinfanaĝaj amikoj, certe vekis lian scivolon kaj precizigis la filozofion kaj la artan sentemon de Zhou-Mack, kiu de tiam neniam ĉesis strebi al idealo. De lia naskurbo, Kimpese en Zairo, ĝis en Eŭropo, traitante Nederlandon, Belgion, Francion, kaj multnombrajn spertojn tiel sur homa kiel sur arta niveloj, la vivvojo de Zhou-Mack al tre persona vidmaniero pri la vivo povis nur inspiri lian kosmopolitan kaj miksetnan manieron komponi kaj ludi; kaj bedaŭrinde por la kulturaj 'administrantoj', inkluzive tiujn de Mobutu, se Zhou-Mack konsideras muzikon unuavice kiel liberecon ! Tra simbiozo de nordaj kaj sudaj ritmoj, kaj kondensoj de bonaj vibroj, Originoj estas laborfrukto de pluraj jaroj kun multnombraj ĉiufankaj kunlaborantoj; kaj kiu, kiel indikas sia nomo, kondukos vin al la originoj de tiu varma, kolorplena, kaj originriĉa muziko.

Por aŭskulti fragmenton aŭ rekte mendi :
<http://www.vinilkosmo.com/?disc=vkcd110&lng=e>

Originoj rete

Kiel decas, Zhou-Mack ja ĉeestas ankaŭ rete kun sia nova albumo, Originoj, prezentita tuj sube. Unue, la cifereca albumo estas jam aĉetebla per elŝuto laŭ formatoj mp3 kaj ogg ĉe: http://www.vinilkosmo-mp3.com/originoj-c-74_194_195.html aŭ laŭ formato flac ĉe: <http://cd1d.com/fr/album/originoj>

Videofilmeto de Zhou-Mack estas elŝutebla ĉe:
<http://www.vinilkosmo-mp3.com/videos-video-clip-zhou-mack-mafuila-originoj-vkcd110-p-1348.html>

Kaj ankaŭ du eltiraĵoj:
<http://www.ipernity.com/blog/vinilkosmo/382253>

Eterne Rima -- duobla albumo

La dua albumo de Eterna Rima, Taglibro de brutulo, estas nun finota kaj estos disponebla komence de majo 2012. Ĝi ofertiĝas kiel double pack, t.e. duobla albumo kun kaj la nova albumo kaj ankaŭ la antaŭa, Samideano (VKKD101). Ĉi tio estas tute nova propono ĉe Vinilkosmo dum la tuta monato majo, do ne maltrafenda! <http://www.youtube.com/watch?v=rHbKiYLR2YA>

Patric la okcitano

Komence de marto, la montpeliera okcitana kantisto Patric enstudiigis por registri albumon en esperanto, helpata kaj arte direktata de JoMo, kun tekstoj tradukitaj de Ludmila Novikova de Moskvo kun helpo de André Andrieux. La projekto estos finita kiam korusoj estos registritaj por kvar kantoj ĝis junio 2012. Do, jen nova kodisko ekskluzive en esperanto estos baldaŭ sur via diskbreto!

Radio MUZAIKO

Radio Muzaiko rete elsendas de post la pasinta somero kun tuttagaj programoj kaj muziko ekskluzive en esperanto... el kiu neneglektebla procento de artistoj el la Vinilkosma katalogo. Muzaiko kaj Vinilkosmo partnere agadas por pli vasta disvolvigo de esperanta muzikkulturo en reta radiofonio. Vi povas aŭskulti Muzaikon per via komputilo aŭ per via poŝtelefono pere de la programo Android. Vi povas aliri Muzaikon per ĝia retejo: <http://muzaiko.info> (Por aŭskulti la radion, nur klaku "aŭskultu".)

Vi povas uzi ankaŭ ĉi tiun programon por Android: <https://play.google.com/store/apps/details?id=dk.nordfalk.esperanto.radio> aŭ alian programon laŭ via elekto. Muzaiko funkcias pere de servilo Radionomy, kiu gastigas plurajn aliajn radiojn. Pro tio, Muzaiko devas havi grandigantan nombron da aŭskultantoj por ke Radionomy daŭrigu la elsendkontrakton. Do, ni kalkulas je vi por aŭskulti Muzaikon kaj subteni kreskantan elsendadon de via preferata muziko!

Fajro en Donneville, sekvo

Post la fajro en niaj ejoj fine de la pasinta jaro, kaj dum kvinmonata necerteco kiam Vinilkosmo restis sen asekuro por la provludejoj kaj registrejo, ni fine trovis solvon. La ejoj estas denove asekurataj de post la 1-a de aprilo 2012. Tio eblas nur pere de la asocio Eurokka, ĉar neniu asekurkompanio akceptis kovri la konstruaĵojn sekve de la fajro en pastinta septembro. Vinilkosmo kontraktis tra Eurokka ĉe la nova asekurkompanio por fari la riparojn kaj fari ĉiujarajn kontrolojn pri la kontraŭfajra kaj elektra instalaĵoj pere de oficialaj fakuloj. Ĉi tiuj konformigoj kaj kontroloj estas farataj, kaj en februaro kaj marto Vinilkosmo komencis malkonstrui la brulintan ejon. La konstruistan entreprenon ĵus komencis la rekonstruadon en la unua semajno de aprilo per la mono de la antaŭa asekurkompanio. Bedaŭrinde, ĉi tiu kompanio rifuzas repagi la tutan laborokoston, ĉar, laŭ ĝi, la ejo estis kaduka. Vinilkosmo estos konstrutereno dum pluraj monatoj, sed tamen ne forgesos la nombrajn aktualajn muzikprojektojn nek la orelojn de siaj legantoj!

Vi povas amplekse disvastigi tiun ĉi informleteron. Se vi ricevis ĝin pere de amiko aŭ konatulo kaj se vi deziras ricevi rekte la venontajn, bonvolu inskribiĝi ĉi tie :
<http://www.vinilkosmo.com/?scb=&lng=e>

Dankon pro via atento.

Plej muzikajn bondezirajn salutojn al ĉiuj legantoj !

Redaktita por vi de Floréal Martorell kaj Mark Eaton

Por persona kontakto kun Flo, bonvolu utiligi :
ffloreal@vinilkosmo.com





Mediterranea Esperanto-Semajno 25.2. - 3.3.2012

Raportas: Liba Gabalda

Jam la 6-an fojon okazis en Francio ĉe la Mediteranea maro la Esperanto-Semajno. Organizas ĝin Monique Prezioso kaj Christine Graissaguel el la E-grupo de la urbo "Saint Raphaël". Antaŭajn jarojn ĝi okazis en la urbo "Agay" kaj ĉi-jare oni elektis la rezidejon de "Vacanciel" ĉe la marbordo de "Les Issambres". Ĝi troviĝas inter la urboj "Fréjus" kaj "Saint Tropez".

La eventon partoprenis ĉirkaŭ cent geesperantistoj, precipe francoj, sed venis gastoj el aliaj eŭropaj landoj: Belgio, Ĉeĥio, Finnlando, Germanio, Hispanio, Hungario, Italio, Svedio kaj Svislando. La aranĝo okazis en luksa apudmara hotelo, kie en la pasinteco feriiis miliarduloj. Post ilia foriro ĝi estis transformita en libertempan restadejon kun bele aranĝita parko. Al ĝi ankaŭ apartenas kelkaj komfortaj dometoj situantaj sur monteto. En apuda konstruaĵo okazis ĉiuj aktivaĵoj de la Semajno.

Matene kaj vespere, antaŭ la manĝoj, okazis E-kursoj de diversaj niveloj. Ni povis pliprofundigi niajn sciojn pri la historio, perfektigi la Elingvon kaj ĉefe la gramatikon. Instruis Perla Miele el Hungario, Zsófia Kóródy kaj Peter Zilvar el Germanio, Pascal Vilain kun sia edzino Mari-Roza kaj Daniel Moirand el Francio. Bone funkciis ankaŭ la libroservo.



Kursanoj sub la gvido de Zsófia Kóródy

La posttagmezoj estis liberaj kaj ĉiu povis elekti sian aktivaĵon. La bela naturo kun florantaj kaj bonodorantaj mimozfloroj logis al montaraj aŭ ĉemaraj promenoj. Pluraj el ni vizitis pli malproksiman ĉirkaŭaĵon peraŭte aŭ buse. Merkrede posttagmeze ni ŝipveturis al la famkonata (pro la filmoj pri Ĝendarmoj) apudmara somerrestadejo "Saint Tropez". De la maro ni vidis luksajn domojn kaj vilaojn de konataj francaj aktoroj, artistoj, kantistoj kaj de aliaj milionuloj. Post agrabla promonado en la pitoreska urbo ni revenis al "Les Issambres".

Vespere ni povis ĝui programerojn de la hotelo (kabaredo, kantado, maskobalo...) kaj ankaŭ la niajn. Peter kaj Zsófia prezentis al ni la Esperanto-urbon "Herzberg" en Germanio kie ili vivas kaj aktivas. Ili invitis la ĉeestantojn al la fervojista kongreso, kiu okazos tie en majo. La geedza paro Hubert kaj Michèle el Belgio prezentis siajn E-aktivaĵojn dum la jaro 2011, Saliko el Finnlando parolis pri sia lando kaj ties kutimoj. Jean-Francois Cousineau el Francio prezentis unikan filmon pri sia vojaĝo al Sumatro kaj ties aventuroj. La lasta vendreda vespero estis dediĉita al prezentoj de la partoprenantoj. Ni aŭdis kantojn, poemojn, skeĉojn, humuraĵojn kaj fine oni ankaŭ invitis al dancado en akompano de akordionoj. La etoso estis gaja kaj agrabla. Sabate matene okazis lastaj kursoj kaj post la tagmanĝo ĉiuj disiĝis al siaj hejmoj. Ni ĝuis agrablan semajnon en bela regiono de suda Francio, kie abundis florantaj mimozoj.





Mediterranea Esperanto-Semajno 25.2. - 3.3.2012 Raportas: Liba Gabalda



25.2. - 3.3.2012



Ĉehinoj prezentas sin

Mediterranea Esperanto-Semajno



Les Issambres



Peter



Zsófia



Perla




Daniel



Pascal



Informoj pri Herzberg



Saint Tropez



Sumatro



Distra vespero



Fotis kaj aranĝis Liba kaj Floreal Gabalda



Poemlibro de Aleksandro Logvin

Komentas: Johano Negrete

Ĉu vi, leganto, memoras la malnovan manieron vendi librojn kun ĉiuj paĝoj borde fermitaj, samkiel virgulinoj, kaj la sperto de la aĉentinto preni tranĉilon kaj malfermi ĝiajn paĝojn kvarope ĝis la librofino? Mi parolas pri ĉirkaŭ duonjarcento antaŭe. Libro el la presejo venis kun bordsigelitaj paĝoj. Se oni pretigis tranĉile iun ajn libron por legado, jam sciis, ke oni estus la vera unua leganto de tiuj paĝoj, kiuj ĵus perdis la virgecon.

Tiu kutimo jam malaperis kaj estis anstataŭata de la hodiaŭa oferto de libroj envolvitaj per travidebla papero. Tiel, danke al la diktaturo de la komerco, oni nun ne povus eĉ travidi la internon de libro kaj scii pri ties litergrando kaj paperkvalito, fotoj aŭ desegnoj, ĉar tian neceson koni presliterojn aŭ enhavtabelon jam multaj librovendistoj simple ne kontentigas. Tiu situacio kutime ĉagrenas min: aĉeti sen ekzameni la varon. Libro estas libroj, fonto de ideoj; ili ne samas sapon, fromaĝon nek tualetpaperon, kiuj devas veni envolvitaj.

Okazis unu tagon de septembro 2004, kiam mi troviĝis en la biblioteko de la Venezuela Esperanto Asocio en Karakaso, ke mi malkovris raran etan libron de nekonata sovetiana poeto, kvankam ne povis foliumi ĝiajn internajn paĝojn, ĉar ili estis sigelitaj laŭ malnova maniero. Libro eldonita de Juan Regulo Pérez en Stafeto, (Beletraj Kajeroj 24) La Laguna, 1964. La aŭtoro estas Aleksandro Logvin (pseŭdonimo Liljer, 1903-1980), ukraino kun diversaj profesioj: “laboristo, fervoja konduktoro, relsanĝisto, kontoristo, metaltornisto, ĵurnalista” (laŭkontraŭkovrile). Tiam mi prunteprenis ĝin kaj hejme post tranĉilmalfermo komencis la legadon.

La dato de ĝia eldono (1964) surprizis min, ĉar tiu libro, jam iomete flaviĝanta, havis manskribon kun la dato 1965 de donaco al la biblioteko. Mi prunteprenis ĝin en 2011. Do, tiu libro sorĉe atendis je mi dum 46 jaroj! Ĝuste por mi ĝi kuŝis tie! Ĉar neniu legis ĝin antaŭe pro tiuj sigelitaj paĝoj. Do, mi “malvirgigis” la libron kaj legis. Ju pli mi progresis legi, des pli mi konvikiĝis, ke tiu ekzemplero estis destinita al mi. Mi, la unua leganto. Eĉ la donacinto ne legis ĝin! Libri habent sua fata! [1]

Tamen tio ne surprizindas rilate al Logvin, se

oni konas pli sian vivon, tiel ke oni povas kompreni lin kiel «alloga kaj bela flutkanto de izolulo», kiu malrapidas por konigi siajn pli intimajn sentojn aŭ por montri sin al la mondo kiel poeto. Ĉar dum longa tempo lia aktivismo kiel poeto kaj esperantisto estis tute dronigita kaŭze de la “granda silento” en Sovetio. Tiel ke oni ne povas kredi, ke dum 25 jaroj Logvin vivis en granda silento rilate al Esperanto. Sed vivadis en senespera silento li kaj aliaj esperantistoj el Sovetio, ĉar la stalina periodo silentigis la voĉojn de Esperanto, laŭ speco de kultura mortigado, kaj ne nur kultura. Laŭ Logvin, pasis 25 jaroj en kiuj li “vidis nek unu esperantan vorton nek unu ĵurnalon”. Estas bone konate, ke Stalino persekutis la lingvon kaj movadon de Esperanto, samkiel la nazistoj, malgraŭ ke la lingvo naskiĝis ene de la tiama imperiestra Rusio.

Sed unu tago de 1959 miraklo! Logvin malkovris la unuan numeron de la literatura revuo Norda Prismo, kaj li multe ĝojis, kiam li sciis, ke Esperanto ankoraŭ ekzistas, ekzistas! Li estis esperantisto ekde 1923.

En la antaŭparolo “Renkonto sur la vivovojo” Ferenc Szilágyi karakterizas la poeton jene: “li apartenas al lirikistoj, naturtalentoj, kiuj vestadas konstante siajn sentojn, reflektajn en la formo de poezio” (p. 9) Jen la poezio kiel interesege vasta taglibro. Malgraŭ la kontraŭaj sociaj cirkonstancoj de la vivo de Logvin (lia patro kaŝis kaj konservis en abelujo la nemomentajn montreblajn esperantaĵojn kaj poemojn de sia filo, ĉar ili estis verkitaj en “dangera lingvo”), kaj malgraŭ liaj individuaj adversaj kondiĉoj, ĉar li havis malbonan sanon kaj suferis pro tio pli ol normalaj limoj («sen mono, sen esper', sen sano, / sen ia ŝanc' de bona nov'» p. 10), li tamen baraktis por starigi lian mesaĝon de –laŭ Szilágyi– “serĉado de feliĉo, vero, justo, libero, kaj amikeco” (p.11). Logvin vekas simpatian kaj sendube kompatindan pro liaj suferoj senprocie amaraj dum malfeliĉaj tempoj

Unu el liaj karakteroj kiel ripetata temo de lia poezio estas la izolo, kiu memorigas nin pri perdita libro Izolo de nia ĉeffiguro de la esperanta poezio, K. Kalocsay [2]. Samgrade lia kanto al la naturo, laŭŝajne kiel plej fidela amik(in)o de Logvin: «orumita iluzi'–/ via dolĉa pepo.../ izolita restas mi/ en la norda stepo...»). De tie mi prenas kelkajn ekzemplojn de

**Poemlibro de Aleksandro Logvin****Komentas: Johano Negrete**

poemetoj kun apartigo de versoj per oblikva streko. Mi ŝatas speciale tiujn dediĉitajn al ĝuado de la naturo, kiu sonas kiel susuro en la mateno, kaj sammaniere al la tono de dolĉamara kanto de la hispana poeto Gustavo Adolfo Becquer.

Lasta Neĝero

Sub reto de neĝo ektermas torento,
ĉu fiŝo arĝenta ekbrilas?
Radias la suno alvenas ĝojsento-
aprilo, aprilo, jubilas!
Printempo karesas ĉe ŝtonparapeto
neĝero kun varma kompatato,
sed ve! malaperas ĉi lasta floreto
de vintro sur ĉarma manplato...

Papilioj

Legis mi, ke estas
la anim' –senmorta,
kaj de tiam, strange,
sentis mi pli forta.
Tiel same sentas
ankaŭ papilioj
kiuj petoladas
super la lilioj.
Jes, la homo scias,
ke la viv' surtera
de la papilioj
estas efemera.
Li sin okupadas
tamen pri vantaĵoj,
inter ili ankaŭ
pri esperantaĵoj.

Finalo estas longa poemo el kiu mi eltranĉas nur pecetoj por montri iom de la sama stilo: tristo, izoleco kaj melodia naturo.

Ne venis tiun vivpremion
por kiu vokis poetfebros
en stato de ciklotimio
nur timo regis kaj tenebro.
sed volas, volas la naturo
de liberama homspirito
la veron de kritala puro,
la kanton simplan sen profito.

(...)

La mort', mi scias –nur banalo,
kaj la forgeso –senbedaŭra.
Ne interesas ĉe l' finalo
salika frondo, krono laŭra.
«Final'! Jen vorto plej belsona!»
En ĝi dirita estas ĉio:
amikoj... floroj... kaj impona
nigraflugila melodio...

Ankaŭ oni devas omaĝi al poeto Aleksandro Logvin, (pseŭdonimo Liljer) per iu aparta trajto sendependa de liaj poeziaj valoroj, kies lingvo fluas facile, sen pretendaĵoj de ĵonglado kaj pedantecaj komplikaĵoj, kaj oni povas bone sekvi la komprenon de sian mildvoĉan stilon. Tiu trajto estas la jena: li aŭdacis sin esprimi en nova lingvo nekonita, ricevis ne la aplaŭdon, sed la silentegon kiel persekuto dum multaj jaroj, eĉ la danĝeron esti perfortita en prizono pro sia lingvo, kaj nur ĝis la jaro 1964 sia poezio povis spiri en libera aero. Li estas iamaniere pro sia tempo kaj jaro de esperantiĝo, unu el niaj karaj pioniroj, al kiuj ni ŝuldas nian amon al la lingvo kaj esperanta kulturo.

[1] Libroj havas siajn destinojn

[2] La poemaro de Kalocsay Izolo restis en presejo, presita kvankam ne bindita, kiam komenciĝis la Dua Mondmilito. Kelkaj jaroj post la milito “la malnovaj oktavoj kuŝis forgesite kaj disŝutite sur la tera planko de kaduka barako”. Dum vizito de R. Rossetti al Kalocsay, la unua povis en la barako pene kunigi nur 5 kajerojn inter tiuj paperaĵoj. Pasis tridek ok jaroj kiam la “dua” eldono – aŭ la vera unua – aperis (UEA, 1977). Memorindaj komenciĝantaj versoj de la unua poemo, samnomita Izolo, estas jenaj:

«Pli kaj pli la izolo de ekzilo
Min ĉirkaŭfermas: inter la tumulto,
Kaj tamen sola, sola, en azilo
De sentoj fremdaj al la granda multo,
Mi vivas fremde, mire, senkomprene,
kiel de praa, senadapta kulto».

Sentoj, kiuj same en Logvin kiel en multaj aliaj esperantistoj, profundiĝis en la konscio pro la katastrofego de eŭropaj militoj en la dudeka jarcento.





Sankta Semajno en mia vilaĝo

Aŭtoro: Ricardo Coutinho

- Panjo! Benu min, mi iros al la universitato, hodiaŭ komencas datravenfestado de la inaŭguro de la Petrola Ekspluatado ĉe nia vilaĝo kaj alvenos kelkaj inĝenieroj por prelegi, vi scias ke mi devas profiti la okazaĵon por koni inĝenierojn, ĉar baldaŭ ili estos miaj kolegoj.
- Dio benu vin kara. Ne forgesu alveni antaŭ la vespermanĝo.

Kiam li proksimiĝas al la aŭtohaltejo li vidas al ribelemhara adoleska belulino, li rimarkas ke ŝi estas Eliza.

- Saluton Eliza!, Saluto sinjorino Sofía, kiel vi fartas?
- Saluton Julio, ni bone fartas, dankon pro via ĝentileco kaj kiel vi fartas? Kiel fartas via patrino?. Diras la sinjorino Sofía.
- Saluton Julio, kie vi iras?
- Mi bone fartas, dankon, mi iras al la Universitato, hodiaŭ okazos prelego pri la detraveno de la petrola ekspluatado en tiu regiono... nu, mi malfruiĝas, pardonu min, poste ni parolos, ĝis!
- Ĝis!. Eliza kaj Sofio samtempe diras, ambaŭ prenis taksion kaj iras al la domo de la avino de Eliza.

Julio eniras al la prelegejo, li estas emociita, salutas al kelkaj samklasanoj kaj sidiĝas. Post kelkaj paroloj de diversaj antikvaj inĝenieroj kiuj laboris tie dum la unua epoko. Ĝus okazas grava surprizo, la lasta preleganto estas tre simila al Julio kiu ŝajnas Julio mem sed kun 20 jaroj pli. Lia vizaĝo heliĝas kaj sentas sian stomakon moviĝi, kial tiu homo pliĝa similas tre al li?, la homo fakte estas lia patro. Fakte li staras kaj foriras de la prelegejo kun la rigardo direkte al horizonto.

Eliza salutas al sia avino, ge-onkloj, ge-kuzoj, ĉiuj estas en la avina domo ĉar ili scias ke Eliza kaj Sofía alvenis al la vilaĝo, vi jam scias ke inter vilaĝa surplanko kaj vilaĝa ĉielo nenio estas kaŝita.

- Saluton Eliza, vi estas pli alta kuzino!. Diras Ramona.
- Saluton Ramona, vi mensogas, vi scias ke la virinoj de nia familio ĉiuj estas tiel malaltaj kiel la junaj ĉevalinoj. Diras Eliza.
- Ja, ĉiu malgranda ĉevalino ĉiam estas juna. Ĉu vi jam vidis al Julio?, venu kun mi al la kuirejo, for de la okuloj de la aliaj... Post via lasta ferio la kompatinda Julio ĉiam demandis al mi kiam mi alvenos, vi sendube enamiĝis je vi.
- Ba!, mi ne kredas, ni nur promenis kaj ni parolis nenion gravan dum tiu promenado. Ĉu vi kredas ke Julio enamiĝos je malbela junulino kiel mi?
- Mi ne kredas... mi nur atestas tion, vi jam scias ke dum viaj plej maljunaj aĝoj li ĉiam estis speciala je vi.
- Do, mi vidis lin ĉe la aŭtohaltejo kaj li apenaŭ salutis nin...
- Fi! Virinoj postulemaj... Almenaŭ vi povis promeni kun li la pasinta ferio, mi ne povas fari tion ĉar mia patro estas tute ĵaluza kaj timigas al ĉiu junulo de la vilaĝo kun la celo ke ili ne amindumu al mi...
- Ja, via patro estas tro ĵaluza, mia patro ĵaluzas de tempo al tempo sed mi havas propra spaco tie, ĉar li ne ŝatas vojaĝi el Karakaso ĝis tien... tro da tempo por li...
- Do, rakontu al mi kio nova okazas sur la stratoj de la ĉefurbo...

Apud al la domo de la avino de Eliza estas la domo de la patrino de Julio, ŝi atendis al Julio por vespermanĝi, paroli kaj dormi sed li ne aperis... Frumatene, Sofía ellitiĝas kaj iras rekte al la kuirejo por kuiri kafon, ĵuse ŝi aŭdas laŭtajn voĉojn ĉe la domo de Margarita, patrino de Julio. Estis la voĉo de Julio, sekvas la ploroj de Margarita kaj la ĉefa pordo de tiu domo bruas post la foriro de Julio. Tuj Sofía proksimiĝas al la pordo kaj vidas al Margarita plorante.

- Kio okazis amikino? ... kiel li kondukis

**Sankta Semajno en mia vilaĝo** Aŭtoro: Ricardo Coutinho

tielmaniere?

- Ho ve! Amikino, ĉu vi memoras Markon?...

- Kiu Marko?

- Marko... la inĝeniero... ĉu vi memoras?

- Ba! li estas via pasinto... kaj li nur amindumis vin dum tre mallonga tempo, do, kompreneble tiu rilato estis dum sekreta ĉar tiutempe vi estis fianĉino de la patro de Julio...

- Ho ve! Sed tiu afero ne finas tiel!, alvenu al mia domo! La najbaroj estas ĉe iliaj fenestroj...

En la domo.

- Vi scias ke mi amis dum multaj jaroj al Julio, vi scias ke mi estis blinde allogita je tiu juna inĝeniero de Karakaso kaj finfine mi riskis mian fianĉan rilaton kun Julio pro tiu aventuro...

- Ja, mi scias tion, dum tiu tempo ĉiu vilaĝano miris la evoluon de la regiono dankon al la petrolkompanio... Sed mi ne rimarkas kiel diable Julio, via filo, foriru de via domo tiel?

- Ho ve! Kara naiva amikino... do, hodiaŭ Julio iris al la universitato ĉar komencis la prelegoj pro la detravena malfermo de la petrolo ekspluatado apud al la vilaĝo... do, alvenis Marko...

- Kaj...

- Kaj... la destino iras ĉiam kontraŭ mi..., tiu Marko prelegis kaj Julio vidis lin tuj li sciis la veron.

- Sed... kial?

- Tiu ulo... tre similas al Julio... mia filo....

- Ĉu vi intencas diri tion kion mi pensas?...

- Jes, ja, li estas sia vera patro...

- Terure! Katastrofe!

- Ja, kaj nun Julio foriris de mia hejmo kaj mi ne scias kion mi povus fari... mi ordonis al Jacinto kaj Petro iri post la paŝoj de li kaj konvinki lin reveni tien... Sed ili ankaŭ estas malkontentaj, ili estas miaj filoj...

Sofia brakumis al Margarita. Post kelkaj horoj Sofia revenas hejmen kaj parolas pri tio okazaĵo al siaj familiano, senvole Eliza aŭskultas tion kaj kaŝe foriras de la hejmo por serĉi Julion. Preskaŭ duonhora ŝi trovas al Julio kaj liaj fratoj, la situacio kortuŝi ŝin kaj alfrontas ĝin laŭ siaj kapabloj. Post kelkaj horoj Julio revenas kune kun siaj fratoj kaj Eliza al la domo de Margarita, Julio ne parolas kun sia patrino tamem ŝi trankviliĝas nur kun vidi lin sana.

Jam estas la sankta ĵaŭdo kaj aperas la Kruca promenado de Jesuo, en tiu vilaĝo estas tre fama pro ĝia prezentado de la pasio de kristo. Jam pasis kelkaj tagoj de tiu malĝoja okazintaĵo kaj dum la promenado Eliza kaj Julio profitas la promenadon por fuĝi kaj resti solaj dum kelkaj minutoj. Ja, multaj homoj promenis, loĝantoj kaj fremduloj marŝas je la kristopasia promenado ĝis la krucumigo de Jesuo.

Dum tiuj minutoj Eliza kaj Julio iras al la alia flanko de la vilaĝo, ĉiu homo estas en la kristopasia promenado kaj ili parolas, rigardas sin kun amo, finfine alvenas la unua kiso de Eliza. Post iu tempo ili taksis ke jam tempo estas por reveni al la kristopasia promenado, kiam ili alvenas al la ĝusta loko por la prezentado de la krucumo ili nur trovas la kruco sola... Kio okazis? Kie estas la vilaĝanoj? Post rigardi tien kaj reen, ili vidas al Petro kaj Julio demandas al li kio okazas.

- Ĉu vi ne scias? Miĥaelo falis de la kruco... vi scias ke li aktoritis kiel Jesuo kaj la ŝnuroj ne estis bone faritaj kaj li falis, lia dekstra brako rompiĝis kaj ĉiu vilaĝano iris kun li al la malsanulejo...

- Do, ni iru!. Diras Eliza iom nervoza ĉar sendube sia patrino jam rimarkis sia malĉeesto...





Promenado tra la historia centro de Karakaso Ricardo Coutinho

Venezuela Esperanto-Asocio

Dum la 31-a de marto 2012, Ben Indestege, belga esperantisto, kaj mi promenadis ĉirkaŭ la placo Bolivaro, ĉefa placo de la urbo Karakaso, unue ni eniris al la Muzeo pri Petrolo ĉe iu stratangulo de tiu placo, poste ni eniris al la Ĉefepiskopa Muzeo, kaj ĵus kiam ni eniris al la Bolivara Muzeo aliĝis al nia promonado Elizabeth de Miranda, poste ni eniris al la Domo de la Liberiginto kaj post kelkaj horoj ni promenadis en la Kalvario, konstruita je la administracio de la prezidanto Antonio Guzmán Blanco, nuntempe ricevas la nomon de Parko Ezequiel Zamora, honora nomo de la martiro de la Federacia Milito okazinta antaŭ la administracio de Guzmán Blanco.



**“La forto de nafto... Kion oni ne konas, oni ne defendas.”
Bildo pri la venezuela naftofirmao.**



Ekspozicio de la Muzeo pri Petrolo






Promenado tra la historia centro de Karakaso

Venezuela Esperanto-Asocio



La Urbodomo de la Municipo Libertador



Placo Bolivaro,
la ĉefa placo de Karakaso




Ene de la Ĉefepiskopa Muzeo



Promenado tra la historia centro de Karakaso

Venezuela Esperanto-Asocio



Ene de la Bolivara Muzeo

Nia belga vizitinto Ben Indestege kun nia venezuela samideanino Elizabeth de Miranda



Pentraĵo pri la morto de nia plej historia heroo Simón Bolívar, La Liberiginto





Promenado tra la historia centro de Karakaso

“Consenso, convivencia pero no coexistencia con todo aquello que hay que erradicar”.



Argelia Laya

“Konsento, kunvivado, sed ne kunekzistado kun tio, kion oni devas elradikigi.”



La domo de Simón Bolívar, nun historia muzeo



Promenado tra la historia centro de Karakaso





KATORELO - Bela libro pri aventuroj de katido

Johano Negrete

En mia hejmo loĝas ne nur mia edzino kaj mi, sed ankaŭ multaj respektindaj kaj postulemaj katoj. Ni zorgas pri ili kiel gemastroj kaj plifoj kiel geflegistoj. Ekde unu jaro kaj duono ni forfuĝis el Karakaso kun niaj katoj por loĝi en kampara domo, kiu ŝajnis trankvila, iom bukolika, kun bela verda montara pejzaĝo, ankaŭ tre sopirata izola etoso, nebulo kaj malvarmo, sed kun la agrabla akompano de nuntempe sep katoj. Pardonu min, ke mi prezentu ilin, ĉar gravas por nia vivo kaj por la libro preparolota.

Tri katinoj kaj kvar virkatoj estas nia ĉefa ĉiutaga panoramo. Alitempe ni havis dek du. Jen la nomoj de la nunaj: Ĉina Luna, la plej aĝa (jam patrino kaj avino), Roberto kaj Blanka, (gefiloj de Ĉina), Nube kaj Mapaĉe, filoj de Blanka; aliflanke estas Kandela, filino de Ĉina kaj Ceniza (Cindrulo). Ĉi lasta estas blinda kato, sed tamen li akcidente koitis kun Ĉina kaj generis. La vera amo de Ĉina estis Paspertú, ŝia unua edzo, kaj tre adorebla tigra kato, kiu mortis pri malsano, farinte vidvinon al Ĉina. Entute ni perdis lastjare aliajn kvar katojn pro akcidentoj kaj malsanoj.

Ni ĉiuj amis kaj ploris pro tiu ĉi belega felino Paspertú, respektita ĉefulo de la grupo kaj impona kato, kiu unue vivis kun ni ok jarojn kiel unika kato. ĴĜis la tago kiam ni havis la neutilan ideon kapti senhejman katinon en urbega komerca centro, kaj alporti ŝin al Paspertú! De tiam komenciĝis la historio de niaj zorgoj pri katoj en ronda familio.

Kelkfoje tamen ili kondukas bone, sed alifoj ĝenas min, ĉar estas vere hejma heroaĵo elteni la multajn pretendaĵojn de tiuj sep felinoj kun tre malsimilaj karakteroj kaj interesoj; kaj mi ne dubas, ke multaj kliŝoj pri beleco aŭ boneco de katoj ne povus malkaŝi iliajn verajn intencojn –mi suspektas– regi la homojn. Tamen, en mia domo oni bezonas mildan karakteron, paciencajn konsiderojn, kompateman spiriton kun multe da observado al ili por ne malsukcesi trovi iom da memkontentigo, kiu povus pravigi nian dediĉon al la kata kamarilo. Jes, kamarilo, kiu ĉantaĝas nin per ĝia beleco, ruzo, tia karesema alproksimiĝo samkiel egoisma apartiĝo kaj sendependo. Rilate al la avantaĝo de katoj mi nun restas dubemulo. Se la bona esperanta poetino Marjorie Boulton nun scius, kion mi diras, plejeble ŝi malaprobis min.

Pro tio, kiam mi trovis ĉe revuo la verkon de Jeannette van Mens Katorelo* tuj ĝin aĉetis kaj legis vore porcele trovi iun savilon al tiu situacio de katservisto, kiun mi travivas, kaj pligrade mia edzino. Malofta libro pri aventuroj de tenera siama katido tra la “ĝangala urbo”, ĉar la protagonisto Katorelo sin sentis forlasita de la mastro, kaj ne ŝatis la provizore fremdam virino, kiu zorgis la bestojn de ĝia hejmo. Katorelo ne ŝatas sian nomon, eble ĉar oni legas Kat-orelo aŭ Kato-relo.

Agrabla libro, se oni volas legi facilan tekston, kaj tenera, se oni amas katojn aŭ ŝatas la psikologion (ĉu katologion?) de tiuj felinoj. Miakaze mi kunvivas kun kata familio kaj fieras, ke mi povas kun ili komprene interrilati. La libron oni povas legi flue, eĉ se oni estas nova leganto, ĉar ĝia vortprovizo ne estas postulema, Bele eldonita de la Nederlanda Asocio por Bestprotektado, kun ĉarmaj desegnoj, kaj bonŝance printita kun grandaj literoj por infanoj kaj maljunuloj. La enkonduko (“Antaŭmiaŭe”) estas de nia Marjorie Boulton, (tiel fama poetino kiel katamantino), kiu jam avertas nin pri kelkaj kuntiraj kvalitoj

de katidoj. Ekzemple, ŝajno de “naiva senkulpeco, scivolemo, ludemo kaj kaprioloj”. Pro tio ĉi kaj aliaj graciaj kvalitoj, al kiuj mi aldonas allogan korpobelon, tiuj ĉi bestoj historie “dresis” la homan rason, kvankam donante agrablan amuzon kaj plezuron.

Sed la temo estas la libro, kaj ĝi estas agrable leginda, kaj oni povas lerni en ĝi pri bezonoj de kato. La aŭtorino rakontas el la vidpunkto de Katorelo, rezonante kaj plendante kiel ĝi, okaze fiera kreaĵo, sed tamen nenio pli sendefenda kiel katido perdita. Tamen ĝia miaŭo povas movi korojn, ĉar estas pli malforta kaj muzika ol la hundobojo. Ial tamen katoj turniĝis sukcesa speco kiel rabobestoj, kaj tre kapablaj supervivi sen la homoj, kvankam preferinde kun ili, male al la situacio de aliaj specoj de felinoj en danĝera stato de malapero. Mia filo ĉiam pensis, ke katoj iun tagon povus disvolvi manojn, kiuj progresigos ankoraŭ pli sian inteligenton.

Mi, kiu jam trapasas la trian aĝon, nun memoras multajn katojn, kiuj ĝojigis mian koron, kiujn mi amis tra mia vivovojo. Sed ne nur kun katoj mi rilatis en la infanaĝo. Tiam estis multaj bestamikoj, kaj tial ekde frue mi komprenis la valoron de la natura mondo kaj klopodis ĝenerale vivi pace kun bestoj, kvankam kelkfoje mi kondutis erare kun iuj el ili.

Naskiĝinte en urbeto, mi tamen hejme ĝuis bonŝance varion da bestamikoj, kiel hundoj, kolumboj, simioj, katoj, kanarioj, papagoj, kunikloj, kaproj. Mi povus doni longan liston de bestamikoj, speciale hundojn, kiuj apartenis al mia vivo. Hundoj kiel Koko, Lila, Bobi, Tutti, Pika, Tundra, Volkán. Katoj el ĉiuj koloroj, kaj malkrom la supraj menciitaj, estis tre memorindaj Tamarán kaj Chinét (geparo de siamoj), Panda, Mefis, Satana. Ankaŭ Katire (Blondulo), al kiu bedaŭrinde ne povis zorgi hejme, sed kun ĝi mi havis specialan amantan rilaton. Menciindas ankaŭ, ke dum pluraj jaroj en venezuela Apartamento, ni tri (edzino, filo kaj mi) havis serpentinton nomita Sinforosa. Ĝi krekis inter ni ĝis la tago, kiam pro impona granda ni liberigis ĝin en arbaro.

Ĉi tie mi volis omaĝi al tiu serio de bestamikoj per iliaj nomoj, ĉiuj gekaraj akompanantoj de mi vivo en diversaj periodoj. Mi ja ne scias ĉu oni havos alian postvivon aŭ ne. Se jes, certe, ĝi ŝajnus kromdonaco sur la aktuala. Kion mi konsideras stultaĵon de kelkaj religioj estas la ideo, ke nur homoj havas animon, kiu supervivas la korpon, sed male bestoj tute ne. Nuntempe, kiam scienco tutplene montris, ke homoj ankaŭ animalas samkiel ĉiuj ekzistantaj estuloj en nia planedo, estas ridinde nei la saman privilegion al la bestoj. Pro tio, se bestoj havus supervivantan animon, samkiel miaj familianoj kaj amikoj, mi ĝojus, ĉar mi povus havi denove ŝancon revidi ilin kvankam aliforme. Sed tamen, mi kredas, ke la vivo jam sufiĉe malavaris al mi pro tia bona amikeco de homoj kaj bestoj, kiujn mi ankaŭ memoras tenere kaj ĝisfine. Sufiĉas unufoje. Konsolas nun memori, kion Don Kihoto asertis: duaj partoj ne estas bonaj...

* Jeannette van Mens: KATORELO; Flandra Esperanto-Ligo, Antverpeno, 1998. (81pp.) Tradukis el la nederlanda: Coosje Dekker-Kiefer. Kun “Antaŭmiaŭe” (Antaŭparolo) de Marjorie Boulton.





Princino de Marso, romano de E. R. Burroughs

Komentas: Johano Negrete

Mi finlegis esperante la romanon *Princino de Marso* (The Esperanto Publishing Co. LTD, Anglujo, 1938), kiu aperis originale angle en 1917. La usonano Edgar Rice Burroughs, al kiu mi volas enmeti ankaŭ inter la unuaj pritraktintoj de la ĝenro fantasta en la dudeka jarcento, memorigas min, pro simileco de stilo, al la aŭtoro H. G. Wells (La Milito de la Mondo, La Tempo-Maŝino, La Homo Nevidebla, kc.) kvankam ne tute impona kiel ĉi lasta. Burroughs ankaŭ estas aŭtoro de la fama serio Tarzán same kiel de verkoj en la fantazia stilo pri la planedoj Marso kaj Venuso.

Princino de Marso estas fantazia verko pri nia najbara planedo, ne tiom bone konata tiam kiel hodiaŭ. La malnova ideo de la marsaj kanaloj originis multe da fantaziaĵoj pri mortanta planedo, kies loĝantoj ne havis sufiĉe da akvo, kaj tial penis konstrui grandegan kanalreton, kiu ekde la polusoj trairas la tutan marsan globon. Tamen nia hodiaŭa astronomio verŝajne ne kredas je la ekzisto de marsaj kanaloj faritaj de inteligentaj estuloj. Sed en la verko de Burroughs la kanaloj ludas signifan rolon en la vivo de marsanoj. Planedo loĝata de diversaj rasoj, verdaj, ruĝaj, homaj kaj nehomaj, diversaj bestoj, sen simileco kun niaj terbestoj, kaj ĉiuj prikribitaj kun fantazio laŭ iliaj variaĵoj.

Kiam Princino de Marso estis eldonita (1917), ankoraŭ J. R. R. Tolkien ne aperigis liajn gravajn verkojn (La Hobito, la Mastro de l' Ringoj) por inaŭguri la grandan ĝenron de fantazia literaturo, ne gravas se ankaŭ William Morris, Robert E. Howard y E. R. Eddison jam antaŭis al Tolkien, en tia ĝenro per famaj verkoj, kiel ekzemple, Konan la Barbaro, sed en Tolkien, la vera majstro de la ĝenro, ni trovas la kreadon de civilizaciojn, kie homoj kunloĝas kune kun aliaj nehomaj inteligentaj rasoj, sur kiuj la homo ne povas regi nek alporti ian superecon. Pro tio, Princino de Marso valoras kiel pionira verko, kvankam ĝia stilo kaj forto ne kompareblas laŭ kvalito de rakonto kaj supenso al la verkaro de Wells.

Kelkaj trajtoj, ne sufiĉe logikaj, estas ŝokantaj en tiu ĉi romano. Ekzemple, la vivreproduktado de marsanoj per ovoj, samkiel birdoj kaj anfibioj. Sed biologiaj kontraŭdiroj stariĝas inter la oftaj kruelaĵoj kaj socia senvalora kondiĉo de marsanoj kun facila detruado de inteligenta vivo, kaj aliflanke la malfacilega longa periodo de naskiĝo (kvin aŭ pli da jaroj de kovado nur por unu sola homa oveto). Ne ekzistas ekvilibro inter morto kaj naskiĝo. La reproduktado pero ovo ĉi-kaze estas vere malalta, ĉar ĝi postulas grandan sinoferon dum la longa periodo de kovado Do, en Marso estas multe pli komune morti ol naskiĝi. Se la vivo ne valoras, kial la reproduktado devas esti tro malfacila? Kial la milito kaj mortigado estas tiom oftaj? Kompreneble ajna viva speco en danĝero de estingiĝo, simple ne povas obstakli al si la naskiĝon, ĝis la punkto de endanĝerigi sian supervivadon mem.

Alikaze, la transportado de la protagonisto Johano Carter de la Tero al Marso ekde la komenco kaj viceversa je la fino estas tute neklarigita en la romano; ĉu sonĝo, ĉu mistika transportado de dioj aŭ superpova forto, flugado per lumo? Kiel tio okazas? Silento en la romano. Do, nekomprebla proceduro ĵetas al Johano iun ajn tagon fali en Marso, kaj same reveni al Tero.

Tamen mi konsentas kun originala ideo kiu aperas en la verko. La marsanoj havas la trajton aŭ kutimon ĉiam diri la veron, t. e. la verdiro-dogmo. Miaopinio tio estas signo de brutaleco kaj generas senbezonaĵajn kruelaĵojn, indiferenton, kaj senvalorigon de la propra vivo. Socio en kiu ĝiaj membroj ne povas mensogi aŭ kaŝi la veron, estus certe stagnanta. Ĝi ne disvolviĝos kaj rapide mortos. La inteligento postulas apartigon inter diro kaj penso, kaj la homaro bezonas por sia progreso mensogi por eviti kruelaĵojn, nenecesajn suferojn aŭ eviti tro obeemajn civitanojn. Kaj ĉi punkte rezultas absurdaĵoj la ordonon de preskaŭ ĉiuj moraloj kaj religioj diri ĉiam la veron aŭ ne mensogi. Kurioze ĝi estas tute nepraktikebla en malferma socio.

Fine de 1917 okazis la Rusa Revolucio samjare ol la publikigo de la romano angle. Tiu koincido permesas senkulpigi erarajn ideojn pri komunismo de E. R. Burroughs, kiu ŝajnas havi tre primitivan aŭ simpligitan koncepton pri tia idealo, kaj kiu kompreneble ŝajnis normale en la usona medio tiupoke. En la jena citaĵo parolas la princino, kiu estas la plej admirindan figuro pro ŝia bona socia inteligento kaj tial ŝi sendube parolas la vidpunkton de Burroughs.

«Raso sen skribita lingvo, sen artoj, sen hejmoj, sen amo; viktimoj de edukado, dum jarmiloj laŭ la terura idealo de la komunismo! Posedinte ĉion komune, eĉ viajn virinojn kaj infanojn, vi sekve nun posedas nenion» (p. 60)

Male, komunismo en progresema industria socio ne signifas «posedinte ĉion komune» ĉar tio neblas. En tia imagita socio – ankoraŭ ne realigita – la komunisma klasika idealo celas harmonigi la privatan intereson kaj la kolektivan, la individuan vivstilon kaj la kolektivan, la individuan liberecon kun la socian. Neniu kontraŭdiro restas en tio.

La romano de Burroughs, kvankam reliefigas pro ĝia peno konstrui aliajn civilizaciojn en tiu stranga mondo de nia najbara mortanta planedo, kun abundo da ruiniĝitaj urboj, kaj civilizacioj, kiuj jam estis venkitaj de barbaroj, tamen ne bazigas sufiĉe sur scienca kaj teknika kono. Pro tio malfacilas nomi ĝin sciencfikcia romano. Sed ĝi gravas kaj pentras sendube sugestantan bildon pri tio, kio povus okazi – laŭ nia propra gusto por memdetruado – je la fino de la vivo sur nia planedo Tero.





Universitata Urbo de Karakaso

Artikolo kaj fotoj: Ricardo Coutinho

La Universitata Urbo de Karakaso (Ciudad Universitaria de Caracas) estas la ĉefa ejo de la Centra Universitato de Venezuelo (Universidad Universitaria de Caracas), ĝi posedas 164,22 hektareojn kun konstruaĵoj kaj terenojn kiuj en tute estas 202,53 hektareoj. Ĝi estas deklarita Riĉaĵo de la Homaro de la UNESKO je la jaro 2000. Ĝi estas en la paroko Sankta Petro de la Municipo Liberiginto de Karakaso, Venezuelo.

La Universitata Urbo estas konsiderata kiel gravaĵo majstra de la kontemporanea arĥitekturo kaj de la urba planizado (laŭ la Uneska Deklaracio).

Ĝi estas grava ekzemplo de la Moderna Movado de la arĥitekturo inspirita de Bauhaŭso. Ĝi enhavas multajn konstruaĵojn klare kaj pure interligitaj kaj riĉigitaj per majstraj modernaj artaĵoj kaj de aliaj plastikaj artaĵoj, dankon al tio ĝi estas nomumita “Sintezo de la Plejaj Artaj”, kaj la plejaĵo estas la Aŭla Magna, en ĝi estas la Akustikaj Nuboj de Alexander Calder, la Olimpa Stadionon kun ĝiaj grandegaj statutoj aludante al la sporto kaj la Plafona Placo kun ĝiaj muraloj (muraj pentraĵoj) kaj skulptaĵoj de famaj artistoj kiel Jean Arp, Fernand Léger, Víctor Vasarely kaj Mateo Manaŭre.

Ĝi estis kontruita laŭ la projekto de la arĥitektistoj venezuelano Carlos Raúl Villanueva, inter la jaro 1940 kaj 1960 sur la terenoj de la Bieno Ibarra, posedaĵo donanta de la Liberiginto Simón Bolívar al la Reĝa kaj Papa Universitato de Karakaso, post la revolucio ŝanĝis ĝian nomon kiel Centra Universitato de Venezuelo.


La Universitata Urbo estis kreita kun la celo ke ĝi estus la plej granda loko por enhavi la plej plimulto de lernantoj, taŭga ĝi por enhavi la plej malnovan universitaton de Karakaso; universitato en unu nur loko.

Dum 1942, sub la registaro de Isaías Medina Angarito, komencis la studoj de la nova projekto. Post revizii diversaj loko finfine estis selektita la Bieno Ibarra, tiu loko estis taŭga por konekti la novan geografian centro kun la Placo Venezuelo.

La duona inaŭguro estis je la 2a de marto 1954 dum la diktaduro de la Leŭteranto-Koronelo Marko Pérez Jiménez kaj estis konsiderita kiel unu el la plej gravaj mondaj arĥitekturaj kreaĵoj de la dudeka jarcento. Je la jaro 2000 UNESKO deklaris ĝi Riĉaĵo de la Homaro, do, ĝi estis la unua premiita en latinameriko per tiu honoraĵo.

Inter la plej gravaj konstruaĵoj kreitaj de Karlo Raŭlo Villanueva estas: Universitata Malsanulejo de Karakaso, Konstruaĵo de la Lernejo de Flegistinoj, Botanika Ĝardeno de la Centra Universitato de Venezuelo, Botanika Instituto, Instituto de Tropika Medicino kaj Anatomia Instituto, Olimpa Stadionon, Universitata Stadionon de Karakaso, Konstruaĵo de Centra Biblioteko-Rektorejo (Koncerta ĉambro, Parainfo de la UCV, Aŭla Magna, Plafona Placo, Konstruaĵo de la Rektorejo, Rektora Placo, Universitata Horloĝo, Konstruaĵo de la Humanisma kaj Eduka Fakultato, Konstruaĵo de la Scienca Fakultato, Konstruaĵo de la Lernejo pri Fisiko kaj Matematiko, Beststudada Instituto, Lernejo de Biologio, Fakultato de Dentostudoj, Fakultato de Apotekostudoj, Fakultato de Arĥitekturo kaj Urbanostudo, Fakultato de Inĝenierado, Lernejo de Sana Inĝenierado, Lernejo de Metalurgia Inĝenierado, Lernejoj de Juraj kaj Politikaj Sciencoj, Naĝejoj, Olimpaj Naĝejoj, Plafona Gimnastikarto, Plafonaj Promenejoj kaj Arkoeniroj.

La Universitata Urbo havas artaĵoj de Jean Arp (franca), André Bloc (franca), Alexander Calder (usona), Wifredo Lam (kuba), Henri Laŭrens (franca), Fernand Léger (franca), Baltasar Lobo (hispana), Antoine Pevsner (rusa), Sophie Taeber-Arp (svisa), Víctor Vasarely (hungara) kaj la venezuelanoj: Miguel Arroyo, Armando Barrios, Omar Carreño, Carlos González Bogen, Mateo Manaŭre, Francisco Narváez (venezuela), Pascual Navarro (venezuela), Alirio Oramas, Alejandro Otero, Héctor Poleo, Braŭlio Salazar, Jesús Soto, Víctor Valera, Oswaldo Vigas kaj León Zapata.





Universitata Urbo de Karakaso Artikolo kaj fotoj: Ricardo Coutinho



En la Fakultato pri Medicino



La Centra Biblioteko kaj Nacia Instituto Pri Filologio



La Centra Biblioteko






Universitata Urbo de Karakaso Artikolo kaj fotoj: Ricardo Coutinho


Venezuela Esperanto-Asocio



Ĉirkaŭ la norda enirejo de la Universitata Urbo, ĉe Placo Venezuelo.



La norda enirejo de la Universitata Urbo



Fakultato de Sociaj kaj Ekonomikaj Sciencoj





Stellarium: Mojosa planetario en via komputilo!


Ramón Morales Castel

(Unua parto)

Stellarium estas la nomo de komputila programo kreita por funkcii kiel virtuala planetario en personaj komputiloj. Kiel kreaĵo kolektiva, ĝi estas ne nur la produkto de la ĉefa teamo kunordigita de Fabien Chéreau, sed ankaŭ la kreaĵo de multaj aliaj, kiuj aldonas pliajn funkciojn kaj enhavojn al la programo. *Stellarium* estas projekto de *Sourceforge* (<http://sourceforge.net/projects/stellarium/>). La kodo de la programo estas malferma por ke la uzantoj kaj programistoj povu plibonigi ĝin. Ĝi disponeblas por la tri pli uzataj komputilaj mastrumaj sistemoj: Linukso, Mac OS, kaj Vindozo. Oni povas elŝuti ĝin tute senpage (ĉi tie: <http://www.stellarium.org/eo/>), kaj ĝi disponeblas ankaŭ en Esperanto, kvankam la traduko ankoraŭ estas plibonigebla.

Eble kelkaj seriozaj ŝatantoj de astronomio taksus *Stellarium* maluzinda pro ĝia ludila ŝajneco, sed la vero estas, ke tiu programo havas multe da seriozaj iloj kaj eblecoj. Malgraŭ ĝia moderna ŝajneco, ĝi certe ne estas ludilo! La versioj 0.10 havas grandegan stelkatalogon: ĉirkaŭ 600 mil steloj. Kaj vi povas elŝuti pli katalogojn por grandigi la kvanton ĝis 210 milionoj da steloj! La versio nun disponebla por elŝutado estas la 0.11.2. Jen vi legos ĉi tie tre resuman trarigardon pri la ĉefaj iloj de *Stellarium*.


Poste de la instalado, startigu la programon. Se vi startigas la programon dum nokto, vi havos fenestron kun plena nigra ĉiela fono, kaj du rektanguloj ĉe la maldekstra malsupra angulo, formantaj kvazaŭ L-liniilon. Tiuj du rektanguloj (unu vertikala kaj unu horizontala) enhavas ĉiom el la funkcioj de la programo. La rektanguloj eble ne vidiĝas pro tio, ke ili aŭtomate enŝoviĝas for de la fenestro. Se tia estas la okazo, tiam surmovu la montrilon de via muso ĝis la rando de la fenestro (maldekstren kaj malsupren): la du rektanguloj devas tuj aperi. Por "fiksi" la rektangulojn en la fenestro, malebligite iliajn enŝoviĝojn, serĉu du tre etajn nigrajn triangulojn ĉe la maldekstra-malsupra angulo. Klaku sur la malsupra trianguleto por fiksi la horizontalan ilaron. La trianguleto iĝos rektanguleto nigra. Klaku sur la alia trianguleto por fiksi la vertikalan ilaron. Same, la trianguleto iĝos rektanguleton por indiki, ke la ilaro estas jam fiksita. Faru inverse por ebligi denove la aŭtomatan enŝoviĝon de la rektanguloj. Kiam la du ilaroj estas forenŝoviĝintaj, vi vidos nur etan linion ĉe la malsupra rando de la fenestro. Tiu estas la *statusa montrilo*. Ĝi montros al vi, demaldekstre: 1) la nunan rigardolokon de la uzanto; 2) la vidkampon (FOV), mezuritan laŭ gradoj; 3) la bildigon de la simulaĵo (FPS), mezuritan laŭ foteroj posekunde (ĉar la simulaĵo en la fenestro estas kiel ia filmo); 4) la daton kaj horon de la nuna simulaĵo.



stellarium


Stellarium estas senpaga programo malfermitkoda. Ĝi montras realisman 3-dimensian ĉielon tiel, kiel oni ĝin vidus nudokule, per dulornetoj aŭ per teleskopo.


Ankaŭ estas uzata kun planetariaj projekciiloj. Simple tajpu viajn koordinatojn kaj ek!



Vidu ekrankopioj

 por Linukso (kodo)

 por Mac OS X

 por Vindozo

 manlibro


Funkcioj

en versio 0.9.0

- ĉielo
- defaŭlta katalogo enhavanta ĉirkaŭ 600,000 stelojn
- aldonitaj katalogoj enhavantaj pli ol 210 milionojn da steloj
- reprezentado de stelfiguroj
- bildoj de nebulozoj (kompleta Messier-katalogo)
- realisma Lakta Vojo
- realismega atmosfero, sun-leviĝo kaj sun-subiro
- la planedoj kaj iliaj satelitoj



Vikio

La Vikio estas la ejo kie la uzantoj de Stellarium konservas la tutan konon pri la programo, kaj kie vi povas ankaŭ kontribui.

-  hejmpaĝo
-  tujstart-gvidlibro
-  oftaj demandoj
-  manlibro por uzantoj
-  skriptoj

Sourceforge

Sourceforge estas la centra retejo kie ni kunlaboras en la disvolvo de Stellarium, kaj kie ankaŭ vi estas bonvena!

-  enhavo
-  forumo
-  ricevi subtenon
-  cimraporto
-  peti novajn funkciojn
-  sendi flikaĵojn



Stellarium: Mojosa planetario en via komputilo! Ramón Morales Castel

Venezuela Esperanto-Asocio

Se la fenestro de la programo estas tutekranigita kaj vi volas malpligrandigi ĝin, premu la klavon F11 de via klavaro aŭ klaku sur la (dedekstre) oka emblemo en la horizontala malsupra rektangulo en la fenestro (vidu la bildon supre). Tiu emblemo reprezentas ekraneton kun eligantaj sagetoj ĉe ĉiu angulo. Kaj ĉi emblemo kaj klavo F11 ŝanĝos la grandecon de la fenestro. La horizontala ilaro entenas la ĉefajn plej uzatajn ilojn de la programo. Tiu ilaro estas kvazaŭ resumo de la iloj entenataj en la vertikala ilaro, kiu enhavas ĉiujn subfenestrojn de la programo. La iloj en la horizontala rektangulo troviĝas do ankaŭ ie ene de la vertikala rektangulo, escepte la emblemoj por manipuli la tempopason (la kvar emblemoj sube de dato kaj horo en la horizontala rektangulo). La lasta emblemo dekstre, apude de tiuj kvar emblemoj, estas la butono por fermi la programon (aŭ fulmoklavo Ctrl + Q en la klavaro).

Por movi la bildon en la fenestro, uzu la maldekstran klavon de via muso: movu la montrilon de la muso premante la klavon. Ĉi tion vi povas ankaŭ fari per la direktaj klavoj de via klavaro (ĝuste apude de la ciferaĵ klavoj). Oni povas ankaŭ "proksimigi" la rigardon tiel, kiel oni faras per teleskopo. Se via muso havas la trian klavon, la mezan radeto-klavon aŭ "rulumilon", pere de ĝi vi povos (mal)pligrandigi la rigardon kvazaŭ (mal)proksimante ĝin rilate al la kosma ekstera spaco. Ĉi tion vi povas ankaŭ fari per la klavoj "paĝo supren" kaj "paĝo malsupren" de via klavaro (ili kuŝas ĝuste supre de la direktaj klavoj). Nun mi resumos vice la ilojn de la vertikala ilaro. Se vi klakas per la musa maldekstra klavo sur iu astro, la programo montros al vi informojn pri ĝi en la angulo supra maldekstra de la fenestro. Por malelekti la astron, klaku la musan dekstran klavon.



La unua emblemo, supre en la vertikala ilaro, nomiĝas "**Fenestro pri loko**". La emblemo estas kompasoj. Klaku ĝin por aperigi la subfenestron **Loko** (ankaŭ per klavo F6). Tiu subfenestro havas mondokarton maldekstre kaj liston de urboj dekstre. Sube, ĝi havas ejojn por skribi koordinatojn, kaj dekstre troviĝas tri gravegaj ejoj: urbo, lando, planedo. Ni povas rigardi la ĉielon de iu urbo ajn el la urboj en la listo. Por serĉi vian urbon, skribu ĝian nomon malsupre en la listo tie, kie vidiĝas lupeo. Se via urbo troviĝas en la listo, tiam ĝi aperos dum vi tajpas la nomon. Se via urbo ne troviĝas en la listo, vi devas tajpi ĝiajn koordinatojn en la subaj maldekstraj ejoj de ĉi tiu subfenestro. (Se vi ne scias la koordinatoj de via loĝloko, vi povus scii ilin helpe de *Google Maps* aŭ *Google Earth*.) Vi povas

La vertikala ilaro: Ĉiuj funkcioj kaj iloj de la programo troviĝas tie.

rigardi la ĉielon de alia planedo aŭ astro, eĉ de la Suno mem! Elektu tion en la ejo planedo. La unua eblo en la listo, Rigardanto de la Sunsistemo, signifas, ke *Stellarium* simulos la rigardon kvazaŭ de supre de la Suna poluso, kvazaŭ vi estus ekster la Sunsistemo. Se vi elektas planedon aŭ astron per la musa montrilo kaj poste premas klavojn Ctrl + G, vi ŝanĝos la rigardolokon al tiu planedo aŭ astro. Tio eblas nur por planedoj kaj astroj ene de la Sunsistemo. Vi povas movi la subfenestrojn ene de la fenestro premante la maldekstran klavon de via muso sur la supra rando de la subfenestro (kie kuŝas la titolo). Finiĝinte pri via dezirata loka vidpunkto sur la Tero, malaperigu la subfenestron per la supra-dekstra ikso.

La dua ilo nomiĝas "**Fenestro pri Dato-Tempo**" (klavo F5). La emblemo estas horloĝo. Ĉi tiu subfenestro estas tre simpla. Pere de ĝi vi determinos la daton kaj la horon de via planetaria rigardado. Demaldekstre tie eblas ŝanĝi: jaron, monaton, tagon; horon, minuton, sekundon. Finiĝinte pri via dezirata dato kaj horo de ĉielrigardado, malaperigu la subfenestron per la supra-dekstra ikso. En la horizontala ilaro troviĝas emblemojn por manipuli la pason de la tempo. La du ekstremaj emblemoj servas por akceli (dektra emblemo) aŭ malakceli (maldekstra) la rapidecon de la tempopaso. Oni faras tion respektive ankaŭ per la klavoj L kaj J en la klavaro. Ju pli oni premas la klavon, des pli granda estas la (mal)akcelado. La alia maldekstra emblemo tie permesas (mal)paŭzi la tempopason (litero K klavare), dum la alia dekstra emblemo revenigas la tempopason al la nuntempa dato (litero 8 klavare).

Ree al la vertikala ilaro... Tie la tria ilo nomiĝas "**Ĉielo kaj rigardo-ebloj**" (klavo F4 por aperigi la subfenestron). La emblemo estas parolveziko kun astroj ene de si. Tiu subfenestro enhavas kvar tre gravajn langetojn. La unua langeto maldekstre nomiĝas "**Ĉielo**". Tie oni difinas la skalon de la steloj (kiel grandaj estos ili bildigitaj) kaj la tremadon de la stela lumo por simuli pli realan panoramon de la ĉielo. La dinamika okuladaptiĝo temas pri la natura rigardokapablo de la homaj okuloj. Se vi malŝaltas ĝin, tiam ĉiuj steloj kaj astraj korpoj en la datenbazo de la programo iĝos videblaj, kio normale ne eblas por homaj okuloj. Oni povas malŝalti la bildigon de la atmosfero (mistradukita en la langeto kiel "etosoj"): se ĉi tiu bildigo estas ŝaltita, kaj se la rigardohoro estas inter sunleviĝo kaj sunsubiro (tago), tiam la tuta fenestro vidiĝos helblue, kiel la taga ĉielo. Malŝaltu tion: tiam la fenestro montriĝos tute nigra, kiel nokta ĉielo. Tio disponeblas ankaŭ en la horizontala emblemario: la emblemo kun nubo kaj suno, la oka demaldekstre, aŭ litero A en la klavaro.

La horizontala emblemario: la plej uzataj iloj de la programo troviĝas tie, ankaŭ la ilo "tempomaŝino", pere de kiu oni ŝanĝas la daton kaj horon de la planetaria simulaĵo.





Stellarium: Mojosa planetario en via komputilo! Ramón Morales Castel

En la ejo “luma poluado”, en la langeto “Ĉielo”, ni havas naŭ gradojn da luma poluado. La urba lumoj estas atmosfera poluo por la astronomia esplorado! Je la unua grado (kaj se vi malŝaltis la montradon de la atmosfero) pliaj steloj kaj astroj iĝos videblaj. Vi povas simuli belajn romantikajn sunleviĝojn aŭ sunsubirojn per tiuj iloj! *Stellarium* povas simuli ankaŭ falstelojn. Ĉi tio estas en la plej malsupra ejo de la ĉi priskribata langeto. Nulo estas neniom da falsteloj, kaj 144000 estas la pleja kvanto da ili (144 mil falsteloj pohore). Dekstre de la langeto troviĝas la iloj pri planedoj kaj satelitoj: montri planedojn, montri indikilojn de la planedoj, montri planedajn orbitojn (kiuj aperos kiel ruĝaj linioj), simuli lumrapidecon, kaj montri la lunon laŭskale. Sube, en la ejo “**Etikedoj kaj markiloj**”, oni (mal)ŝaltas la nomojn de la steloj, la videblecon de la nebulozoj (kiuj aperos kiel flavaj cirkletoj) kaj de la nomoj de la planedoj. Per la glataj kontroliloj tie oni (mal)pligrandigas la videblan kvanton da steloj, da nebulozoj, kaj da planedoj. En la horizontala ilaro, videbleco de nebulozoj estas la naŭa emblemo demaldekstre aŭ litero N en la klavaro, kaj nomo de planedoj estas la deka emblemo aŭ litero P en la klavaro.

La dua langeto nomiĝas “**Markiloj**”. En la ejo “**Ĉiela Sfero**” oni (mal)ŝaltas plurajn reprezentaĵojn de la ĉiela spaco. La homo astronomie reprezentas la ĉielon kiel surfacon, same kiel la surfacon de la Tero. Mapoj de la Tero estas reprezentataj laŭ ortaj aŭ kurbaj linioj (kradaj kartoprojekcioj). Tiel ankaŭ la ĉielo estas reprezentbla per linioj, kiuj dividas ĝin kiel oni dividas surfacon. Tiuj estas la kontroliloj en “**Ĉiela Sfero**”: Ekvatora Krado, Ekvatora J2000 Krado, kaj Azimuta Krado. Ĉiu el ili havas sian propran utilon, depende de tio, kion vi celas. La Galaksia Krado reprezentas la ĉielon kiel sferan surfacon. La sekvaj kvar linioj estas tre utilaj: la ekvatora linio, la meridiana, la horizonta, kaj la ekliptika. Tiuj linioj helpas nin kompreni nian vidpunkton kiel sur Teraj rigardantoj de la ĉielo. La ekvatora linio (blua en la simulaĵo) estas projekcio sur la ĉielo de la Tera ekvatoro: pro tio la ĉefpunktoj Okcidento kaj Oriento de la Tera horozonto troviĝas sur tiu linio. La meridiana linio (verda en la simulaĵo) estas projekcio de la Tera meridiano sur la ĉielo: pro tio Nordo kaj Sudo troviĝas sur ĝi. Ekvatora kaj meridiana linioj ĉiam estas je 90° rilate unu la alian, kiel en la tersurfaco. La horizonta linio (verda) reprezentas la horizonton de la nuna rigardoloko en la programo, kaj entenas la kvar geografiajn ĉefpunktojn de la Tero. La ekliptika linio (ruĝa en la simulaĵo) reprezentas la orbiton de Suno tiel, kiel ni vidas ĝin en la Tero. La linio pri la galaksia ebena (malhele flava linio) reprezentas la ekvatoron de nia galaksio. Tiu linio estas ekzakte la ekvatora linio de la Galaksia Krado: la fizikaj videblaj korpoj de la Lakta Vojo vidiĝas sur tiu ĉiela strio. En la horizontala ilaro disponeblas ankaŭ emblemo por (mal)ŝalti la Ekvatoran Kradon (la kvara emblemo maldekstre aŭ litero E klavare) kaj la Azimutan Kradon (la kvina emblemo maldekstre aŭ litero Z klavare). La geografiaj ĉefpunktoj aperas pere de la sepa emblemo aŭ litero Q en la klavaro.

Denove en la langeto “**Markiloj**”, la dekstra ejo nomiĝas “**Stelaroj**”. Tie oni povas videbligi la figurojn de la stelaroj, iliajn nomojn kaj iliajn limojn, ĉio ĉi tio laŭ la tradicia okcidenta astronomio. Oni povas ŝanĝi tion en la lasta langeto: “**Stelfolkloro**”. Tie disponeblas dek tri stelfolkloroj kun siaj ĝeneralaj priskriboj. En la horizontala ilaro, la stelaraĵoj estas videbligotaj pere de la unua maldekstra emblemo aŭ litero C klavare, kaj la stelaraĵoj pere de emblemo dua aŭ klavara litero V... En la subfenestro, la tria eblo en la langeta ejo temas pri la arta reprezentaĵo de la stelaroj. (Ĉi tio estas la emblemo tria en la horizontala ilaro aŭ litero R en la klavaro.) La travideblecon de la artaj bildoj oni povas kontroli per la ciferoj en ĉi priskribata ejo. La tria ejo de la langeto temas pri la projekcioj de la ĉielo. Projekcioj estas la maniero laŭ kiu *Stellarium* montras al ni la ĉielon, la maniero reprezenti la ĉielon kiel surfacon. Oni povas nur kompreni la utilecojn/malsamecojn de la projekcioj elektante ilin kaj komparante ilin. Elektu ĉiun el ili kaj trarigardu la simulaĵon. Ĉiu projekcio havas sian propran kvanton da FOV (laŭgrada vidkampo). Dekstre de la listo vi trovos priskribon pri ĉiu projekcio.

La projekcio **Perspektivo** (FOV: 120°) estas eble la plej realo-simila reprezentaĵo. Ŝaltu la sesan emblemon maldekstre en la horizontala ilaro (aŭ litero G en la klavaro) por bildigi la surfacon de la Tero. Poste ŝaltu ankaŭ la emblemon atmosfero (la okan demaldekstre). Tiam vi havos realeskan pejzaĝon de la surfaco de la Tero kvazaŭ foton aŭ 360-gradan panoramon. Ŝanĝu al **Egala Areo** (FOV: 360°) en la langeto, kaj tiam vi rigardos la ĉielon kvazaŭ ĝi estus ebena ronda surfaco. La projekcio **Luko** (FOV: 180°) reprezentas la ĉielon kiel perfektan sferon, kvazaŭ vidante la ĉielon per porda luketo. La projekcio **Hammer-Aitoff** havas 360-gradan FOV, sed ĝi tordas la liniojn depende de la movoj de la rigardopunkto kaj bildigas la ĉielon kiel surfacon de elipsa globo. **Cilindro** kaj **Merkator** estas similaj, kun FOV egala al 233,333°, sed **Cilindro** reprezentas la ĉielon ene de horizontala strio tiel, kiel ni bildigas kelkajn el niaj mondokartoj. La **Ortografia** projekcio estas kiel **Luko**. Ambaŭ iliaj FOV estas 180°, sed per **Luko** oni vidas la ĉielon kvazaŭ deinterne de ĝi, dum per **Ortografia** oni vidas ĝin kvazaŭ deekstere.

La tria langeto en la subfenestro nomiĝas “**Pejzaĝo**”. Tie oni povas ŝanĝi la simulaĵon laŭ jam pretigitaj pejzaĝoj. Ekzemple, **Garching** (pretigita de Fabien Chéreau) estas la pejzaĝo ĉe la sidejo de ESO (Eŭropa Organizaĵo por Astronomia Esplorado) en Germanujo. La langeto montras la koordinatojn de ĉiu pejzaĝo, ĝian aŭtoron kaj la rigardolokon. Sube disponeblas gravan kontrolilon por (mal)ŝalti la simulaĵon de la grundo. Tio ankaŭ estas en la sesa emblemo de la horizontala ilaro aŭ litero G de la klavaro. disponeblas pejzaĝo el planedo Marso, Luno kaj eĉ Saturno. En la langeto vi povas ankaŭ alŝuti aliajn pejzaĝojn de via plaĉo por uzi en la programo.



(DAŬRIGOTA)



Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto jam kilobajtas! Ramón Morales Castel

Venezuela Esperanto-Asocio

Nia plej bona unulingva vortaro de Esperanto, la **Plena Ilustrita Vortaro**, jam estas disponebla senpage en la interreto. La versio aperis komence de 2012. Ĝi estas ankoraŭ en sia beta-versio, kaj por uzi ĝin oni devas nur registriĝi. Vi bezonas do nur uzantonomon kaj retadreson por uzi la ĉi vortaron. La realigo de la projekto daŭris iom da tempo sed la rezulto estas ja bonkvalita kaj uzinda.

La paĝo sekvas la ĝeneralajn trajtojn de la plimulto de la retaj vortaroj. Poste de via registriĝo, vi havos senplenan kampon, kie vi skribu la serĉatan vorton. Dum tajpado de la vorto, la programo montras sugestojn pri via serĉo.

La vortaro ankaŭ sekvas la paĝaranĝon de la originala papera vortaro: la artikoloj estas montrataj per kapvortoj, kiuj direktas al pliaj kunmetitaj aŭ derivitaj vortoj. La cititaj ekzemplaj frazoj ankaŭ ĉeestas en la artikoloj kaj estas tre facile vidi la aŭtorajn referencojn de la citaĵoj.

<http://vortaro.net/>

vortaro

Sugesto: tajpu laŭ x-sistemo aŭ uzu verajn supersignojn.

* **vorto**

- 1 **Δ** Morfemo aŭ morfemkombinaĵo, konsistiganta sintakse uzeblan «eksklubanojn» konsistas el ses morfemoj. □ vortospeco. □ vortfa vortsintakso.
- 2 Unu el tiuj kombinaĵoj, komunuze konsiderata kiel esprimanta unu ĝustan vorton; la bildoj elvokitaj de la vortoj; kanto sen vortoj **z**; vortojn **z**; ĉe tiuj ĉi vortoj la hispano faris tiajn gestojn, ke [...] **z**; ŝi insultajn vortojn al tri estimataj gazetoj **z**; kruda, maldeca vorto. □
- 3 Iu vorto, konsiderata kontraste kun la esprimata ideo: oni ne deva peni ilin kompreni; faroj estas fruktoj, sed vortoj estas nur folioj; k vortojn, vortojn, vortojn **z**; vortoj ne povus tion eldiri **z**.
- 4 Senio da vortoj, formantaj unu aŭ plurajn mallongajn frazojn: pli bona vorto ol kuko agrabla **z**; de vorto ĝentila ne doloras la lango **z**; vorton malveran virtulo malamas **x**; kiu ŝparas siajn vortojn, tiu estas prudenta **x**; per unu vorto li estas la perfekta rigardanto **z**; per malmultaj vortoj **z** (resume); lasi al iu la lastan vorton **z** (lasi venki en diskuto); sed la lasta vorto tamen restis mia **z**; ne venis ankoraŭ la tempo diri la lastan vorton pri tiuj dubaj formoj **z**; neniu devis diri al ŝi ian malbonan vorton **z**; ŝi ne diris eĉ unu vorton pri tio **z**.
- 5 Buŝa promeso: teni, plenumi sian vorton **z**; vorto donita estas kiel leĝo **z**; estu sinjoro de via vorto **z**; je mia vorto! **z** (mi certigas pri tio); vorton de honoro! **z**; mi jam promesis, k preni

Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto

La vortaro estas uzebla nur por registritaj uzantoj, bv. registriĝi aŭ ensaluti.

Sugesto: tajpu laŭ x-sistemo aŭ uzu verajn supersignojn. Serĉi

La fama vortaro de Esperanto jam en la reto! Tio estas **beta-versio** de la sistemo kaj tio signifas, ke vi povas ankoraŭ sperti iujn problemojn aŭ teknikajn mis-funkciojn. Sed iom post iom ni esperas plibonigi tion. Dankon al ĉiuj, kiuj faris tiun ĉi projekton ebla.

[Pri la projekto](#) [Kontaktu nin](#) [Subtenu nin](#)

Pri la projekto

Ĝenerale

Bonvenon ĉe **vortaro.net** - la reta versio de unu el la plej famaj E-verkoj de lastaj jardekoj "Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto" (PIV). Jam multajn jarojn PIV estas la plej ampleksa difin-vortaro en Esperanto, kiu unuan fojon aperis en la jaro 1970. Al la enhavo de la vortaro kontribuis multaj personoj. La liston de tiuj personoj vi povas trovi ĉe [tiu ĉi paĝo](#). Ekde aprilo 2012 PIV estas uzebla ankaŭ en la reto.

Partneroj

Sennacieca Asocio Tutmonda (SAT)

Sendependa, neneŭtrala tutmonda Esperanto-asocio, kiu fondiĝis en 1921 kiel la organizaĵo de la Laborista Esperanto-movado. SAT disponigis al la projekto la enhavon de la vortaro, kiu estis kreata dum jaroj dank' al kunlaboro de [multaj personoj](#). Kadre de la nova sistemo SAT daŭre estos la sola posedanto de la enhavo kaj okupiĝos pri ties konstanta plibonigo kaj prizorgo. www.satesperanto.org

Edukado@Interreto (E@I)

Neŭtrala, neregistara junulara organizo, kiu oficiale ekzistas de la jaro 2005. Kadre de tiu ĉi projekto la organizo respondecas pri organizado de la kampanjo, reklamo, administrado de la reta versio. E@I disponigis al la projekto la servilan spacon kaj la retregionon. www.ikso.net

Teknika realigo

La tuta programado, aspekto kaj prilaboro de la datumoj de la vortaro okazis kadre de la firmao "Studio GAUS". www.studiohaus.com

**La realigintoj de la projekto:
Tre bona laboro! Gratulojn al ili!**

La artikoloj montriĝas tiel, kiel en la originala verko.